# Boletín

nº 425 Januaro - Marto 2019



Asociación de utilidad pública

FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

# Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 425

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj
* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn
*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro
Financaj aferoj: financoj@esperanto.es
Aliaj aferoj (escepte de financaj):
admin@esperanto.es

**Hispana Esperanto-Federacio**
***Federación Española de Esperanto***

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7
ES-28015 Madrid
admin@esperanto.es
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31 0204011961
TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926 4025
Poŝtelefono: +34 638 547 104
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon en la aŭtomata respondilo)

**Estraro**

| | |
|---|---|
| **Prezidanto:** | José Antonio del Barrio |
| **Vicprezidanto:** | Ángel Arquillos López |
| **Sekretario:** | Águeda Biurrun |
| **Kasisto.** | Jesús M. García Iturrioz |
| **Voĉdonantoj:** | Eduardo Berdor |
| | Raúl Martínez |
| | Alejandro Escobedo |

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

# Salutvortoj

Karaj geamikoj:

Vi ricevas nun la unuan numeron de la jaro 2019 de la bulteno de nia asocio. Kiel tradicie, tiu ĉi fariĝas la momento ellabori bilancon de la pasinta jaro, kaj pretigi la sekvan ciklon. En la bulteno vi trovos la kunvokon por la Ĝenerala Kunveno de la Federacio, kiu okazos sine de la Kongreso en Malago, komence de majo, al kiu aldoniĝas la raporto ekonomia kaj la resumo de la aktivaĵoj realigataj dum la jaro 2018.

Ni pensas ke ĝi estas sufiĉe kontentiga, konsiderante la celojn planitajn por tiu jaro. Sed aliflanke eble ni estas ne sufiĉe ambiciaj. La socia situacio devus postuli pli intensan agadon de nia movado kaj nia asocio, por krei la kondiĉojn por ke la ideoj de Esperanto, ĝia internacia kaj universalisma elano, atingu la rolon kiun ĝi devus havi en nia socio. Certe pri tio ni devus paroli en Malago.

La kongreso de nia asocio devus do esti la momento por plani nian estonton. Ne nur por la jaro 2019, sed ankaŭ por la postaj. Ni memoru ke en 2020 finiĝas la deĵorperiodo de la nuna estraro, kaj ni ŝatus plani jam la ŝanĝon en la gvidado de la asocio. Pri tio, kaj pri niaj planoj por la estonto, ni devus trankvile sed intense paroli vid-al-vide.

Ni invitas vin ĉiujn ĉeesti en Malago, ne nur pro tiu labora celaro, sed precipe ĉar la lokaj organizantoj pretigis por ni tre kompletan programon –kiun vi trovos skize en tiuj ĉi paĝoj–, en kiu ankaŭ kulturo, distro kaj turismo havos elstaran lokon. Krome, ni profitos la ĉeeston de internaciaj vizitantoj, partoprenontoj de la parte koincida kongreso de la Esperantistaj Fervojistoj, por ĝui la komunikan rolon de la lingvo, super barieroj kaj malamoj.

Venu al Andaluzio, vi ĝuos ĝin!

José Antonio del Barrio
Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio

# ENHAVO

| | |
|---|---|
| Salutvortoj | 1 |
| Asamblea General Ordinaria | 3 |
| Detala spezokonto 2018 | 4 |
| Buĝeto 2019 | 5 |
| Raporto pri aktivaĵoj 2018 | 6 |
| Dokumentoj alvenitaj al la Biblioteko 2018 | 12 |
| Belarta rikolto 2018… | 14 |
| Pliaj ekspozicioj pri Esperanto | 15 |
| En la reto, Retejo en facila Esperanto | 16 |
| Retejo por aktualaj filmoj kaj renkontiĝoj | 16 |
| Du premioj por amikoj de Esperanto | 17 |
| Nidebatu la lingvan situacion de Eŭropo…. | 18 |
| Triopa Kongreso-Malago 2019 | 19 |
| Provizora programo de la Triopa Kongreso | 21 |
| Kunvoko por kongreso kaj estraro | 23 |
| Vizito de la prezidanto de HEF al Santandero | 24 |
| Tubaro, nova retejo por trovi esperantlingvajn videojn | 26 |
| Brila apero de la ibera skolo en Esperantujo | 28 |
| El la poemaro rev-ene | 30 |

## KUNVOKO POR KONGRESO KAJ ESTRARO

La estraro de HEF devas ankoraŭ decidi pri la okazigo de la Hispana Kongreso de la jaro 2020, kaj restas do malfermita la kunvoko por ties organizado. Se iu ano de la asocio aŭ iu grupo, deziras diskonigi sian urbon al la hispanaj kaj vizitantaj esperantistoj, vi nun havas la ŝancon! Kontaktu kun la estraro, por studi la detalojn.

Ni rememorigas ke en 2020 finiĝas la deĵorperiodo de la nuna estraro de Hispana Esperanto-Federacio. Iuj nunaj estraranoj jam anoncis sian intencon ne rekandidati por la nova periodo. Sekve, ni petas al la anoj ke ili komencu pripensi pri sia propra kandidatiĝo, aŭ pri la neceso plani la ŝanĝon de estraro. Pri tio estas anoncita specifa programero dum la Hispana kongreso, dum kiu ni komencos pretigi la novan konsiston. Venu, kaj diskutu la aferon kun ni en Malago!

# ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA

El Presidente de la Federación Española de Esperanto invita a los miembros de la asociación a participar en la Asamblea General Ordinaria, que tendrá lugar el domingo 5 de mayo de 2019, a las 9:30 horas (a las 10:00 en segunda convocatoria) en la "Casa Diocesana" en la calle Pasaje de los Almendrales, 2-4, de Málaga, sede del 78º Congreso Español de Esperanto, con el siguiente orden del día:

1.- Lectura y aprobación del acta de la anterior asamblea (21 de julio de 2018).
2.- Aprobación de las cuentas y tesorería del 2018.
3.- Aprobación de la Memoria de Actividades del 2018.
4.- Informe de los socios.
5.- Aprobación del Presupuesto para 2019.
6.- Cuotas para el año 2020.
7.- Renovación parcial de la Junta Directiva, si procede.
8.- Proyectos para 2019-2020. Preparaciones para el cambio de directiva en 2020.
9.– Modificaciones de la normativa de congresos
10.-Ruegos y preguntas.

IMPORTANTE: Los miembros de la Federación que deseen ser representados por algún otro socio, deben enviar un mensaje indicando claramente el nombre completo del representante y representado, al buzón electrónico, admin@esperanto.es o bien por correo postal a las oficinas de la asociación, antes del 30 de abril.

El Presidente de la Federación
José Antonio del Barrio Unquera

**ORDINARA ĜENERALA KUNVENO**

La Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio alvokas la anojn de la asocio partopreni Ordinaran Ĝeneralan Kunvenon, kiu okazos la 5-an de majo de 2018 (dimanĉe), je la 9:30 horo (je la 10:00 horo en dua alvoko), en la "Casa Diocesana" (Dioceza Domo) ĉe strato Pasaje de los Almendrales, 2-4, de Malago, sidejo de la 78 Hispana Esperanto-Kongreso, laŭ la jena tagordo:

1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa eksterordinara kunveno (21 julio 2018).
2.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2018
3.- Aprobo de la raporto pri aktivaĵoj de 2018
4.- Informo pri la anaro.
5.- Aprobo de la Buĝeto por 2019.
6.- Kotizoj por la jaro 2020.
7.- Parta renovigo de la Estraro, se necese.
8.- Projektoj por 2019-2020. Pretigado de la ŝanĝo de estraro en 2020.
9.– Modifo de la regularo pri kongresoj.
10.-Sugestoj kaj demandoj.

GRAVA RIMARKO: La membroj de HEF, kiuj deziras esti reprezentataj fare de alia membro, sendu mesaĝon informante pri tio, klare indikante la kompletan nomon kaj de la reprezentanto kaj de la reprezentato, al HEF-a retpoŝta adreso admin@esperanto.es, aŭ per ordinara poŝto al la oficejo de la asocio, antaŭ la 30-a de aprilo.

La Prezidanto de HEF
José Antonio del Barrio Unquera

# DETALA SPEZOKONTO 2018

| ENSPEZOJ | | | ELSPEZOJ | |
|---|---|---|---|---|
| KOTIZOJ | 6.185,00 | | BOLETÍN | -2.833,82 |
| KONGRESOJ: | | | OFICEJAJ MATERIALOJ | -758,63 |
| Kongreso Madrido | 410,42 | | PROPAGANDO DIVERSA | -190,00 |
| IJK Badajoz | 3.605,86 | | RETO KAJ KOMPUTILAĴOJ | -1.130,69 |
| SUBVENCIOJ: | | | KOMPUTILO SIDEJO | -808,88 |
| Kongreso Teruel 2017 | 4.820,00 | | BANKMAKLERAĴOJ | -1.137,55 |
| Fundación Esperanto | 200,00 | | SIDEJO- KOMUNUMO | -796,92 |
| LIBRO-SERVO | 1.787,98 | | LIBROAĈETOJ | -246,90 |
| UZO SIDEJO: MEL | 42,30 | | TELEFONO | -638,60 |
| | | | POŜTO | -417,04 |
| | | | ELEKTRO | -254,72 |
| | | | KOTIZO UEA | -203,52 |
| | | | SIDEJA ASEKURO | -130,39 |
| | | | HEJS (BENKONTIĜO) | -94,15 |
| | | | DIVERSAJ | -93,25 |
| **SUMO ENSPEZOJ:** | **17.051,56** | | **SUMO ELSPEZOJ:** | **-9.735,06** |

SALDO 31/12/2017:37.985,20
SALDO 31/12/2018:45.301,70

PODETALE (31/12/2018):

BBVA 41.061,53
UEA-konto 2.730,80
TRIODOS 721,53
PAY PAL 414,22
MADRIDA KASO 373,62

**SUMO 45.301,70**

# BUĜETO 2019

| ENSPEZOJ | | | ELSPEZOJ | |
|---|---|---|---|---|
| HEF-KOTIZOJ | 6.500,00 | | BOLETÍN | -2.900,00 |
| LIBRO-SERVO | 2.000,00 | | OFICEJAJ MATERIALOJ | -800,00 |
| MEL-UZO SIDEJO | 150,00 | | PROPAGANDO DIVERSA | -1000,00 |
| ALIAJ (Subvencioj-kongresoj-mondonacoj, …) | 1.300,00 | | RETO KAJ KOMPUTILAĴOJ | -1.100,00 |
| | | | SIDEJO KOMUNUMO | -800,00 |
| | | | TELEFONO | -650,00 |
| | | | LIBROAĈETOJ | -500,00 |
| | | | POŜTO | -500,00 |
| | | | KOTIZO UEA | -300,00 |
| | | | ELEKTRO | -300,00 |
| | | | BANKMAKLERAĴOJ | -300,00 |
| | | | SIDEJA ASEKURO | -150,00 |
| | | | DIVERSAJ | -650,00 |
| **SUMO ENSPEZOJ:** | **9.950,00** | | **SUMO ELSPEZOJ:** | **-9.950,00** |

# RAPORTO PRI AKTIVAĴOJ 2018

## 1. INTERNA ADMINISTRADO

1.1. La estraro kunsidis 5 fojojn.

1.2. Okazis du ĝeneralaj kunvenoj: unu ordinara en Madrido, la 13an de majo 2018, kaj alia eksterordinara, la 21an de julio dum la Hispana Kongreso 2018 en Madrido.

1.3. Oni eldonis kvar numerojn de "Boletín" (421, 422, 423 kaj 424).

1.4. Biblioteko *Juan Regulo Pérez*: Ĝi daŭre estas alirebla de ĉiuj interesatoj, tamen nur HEF-anoj rajtas prunt-preni. Ĝi riĉiĝis per novaj eroj.

1.5. Bitoteko: HEF plu flegas la bitan bibliotekon, *Bitoteko,* kies materialo estas alirebla rete, kaj kiu apartenas al la retoj Hispana kaj Europeana. Dum 2018 oni aldonis pli da materialo.

1.6. Daŭris la sendado de la "Bitbulteno", informilo sendata restpoŝte al la anaro kaj aliaj interesatoj averaĝe unu fojon monate (10 eldonoj dum la jaro 2018). Ĝi estas dulingva (hispana kaj esperanta), kaj la nunaj ricevantoj estas pli ol 1 100.

1.7. HEF-retpaĝo: dum 2018 ĝi ricevas proksimume po 2 000 vizitojn semajne.

1.8. Sociaj retoj: HEF kaj HEJS havas kontojn en *Facebook* (kun proksimume 1600 ŝatantoj) kaj *Twitter* (1200 sekvantoj), kiuj estas regule uzataj por disvastigi informojn pri aktivaĵoj kaj pri E-o. Oni aldonis pliajn videojn al la kanalo de HEF en *Youtube*, kiu havas 1400 sekvantojn; entute la filmetoj de la kanaloj jam estis spektitaj pli ol 250 000 fojojn. HEJS malfermis kanalon en la socia reto Instagram. Ankaŭ funkcias diskutkanalo en *Telegram*.

## 2. ASOCIOJ

2.1. La lokaj kaj regionaj grupoj daŭrigas sian funkciadon.

2.2. Dum 2018 oni kreis la novajn grupojn: Fuenlabrada Esperanto-Ligo kaj Ekstremadura Grupo de Esperanto (BONEGE). Malfondiĝis la Fervojista Asocio de HEF kaj ĉesis aktivi la Asocio "Jozefo Anglés" de Sant Cugat del Vallés kaj la Barcelona Esperanto-Centro.

## 3. INSTRUADO KAJ TREJNADO

**3.1** La Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED) aprobis oficiale la aldonon de Esperanto al la listo de lingvoj instruataj en ĝia centro CUID (Centro Universitario de Idiomas Digital y a Distancia, Universitata Bita kaj Neĉeesta Lingvo-Centro). HEF subskribis oficialan interkonsenton kun UNED, por kunlabori en la pretigado kaj instruado de tiu kurso. La unua kunvokita kurso estas laŭ la nivelo A2, kaj ĝi komenciĝis en la akademia jaro 2018-2019. Teamo de membroj de HEF kunlaboras en la pretigado de la materialo. HEF kunlaboris en la selektado de instruisto de la kurso.

**3.2**. Membroj de HEF gvidis kursojn en kelkaj urboj tra la tuta lando, precipe organizitaj de la lokaj kluboj.

**3.3.** Dum la jaro 2018 plu daŭris la kurso de Esperanto en la Universitato de Sevilo. En oktobro komenciĝis nova kurso de Esperanto en la Oficiala Lernejo pri Lingvoj de la urbo Fuenlabrado (Madrido), danke al la iniciato de la nun fondita loka grupo.

**3.4.** HEF-anoj komencis organizi en pluraj urboj specialajn renkontiĝojn por lernantoj de Esperanto, speciale destinitaj al la homoj lernantaj per la reto, profitante la novan ilon de kreado de ĉeestaj renkontiĝoj kaj eventoj de la reta aplikaĵo por lingvolernado Duolingo.

**4. KONGRESOJ**

**-Organizitaj de HEF aŭ ties aliĝintaj asocioj aŭ aktivuloj**

**4.1**. 77a Hispana Kongreso okazis inter la 20a kaj 22a de julio, en Madrido, organizita de Madrida Esperanto-Liceo.

**4.2**. 51a Kongreso dela Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazis en Madrido, de la 21a ĝis 28a de julio 2018. Ĝi inkludis Seminarion en kunlaboro kun la universitato.

**4.3**. La Internacia Junulara Kongreso de Esperanto okazis en Badaĥozo, en aŭgusto, kunorganizita de HEJS, la junulara sekcio de HEF..

**4.4**. Tendaro de la Verdaj Skoltoj, ekde la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto, en Los Molinos (Madrido)

**4.5**. La Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo okazis en Salou, en oktobro.

**4.6.** La junulara sekcio de la Federacio, HEJS, organizis renkonton kiu nomiĝis "Benkontiĝo" la 6an, 7an kaj 8an de decembro en Madrido.

**4.7**. Esperanto-asocioj apartenantaj al HEF festis la Zamenhofan Tagon tra la tuta lando dum la dua semajno de decembro.

**-Partoprenataj de membroj de HEF**

**4.8**. 103a Universala Kongreso en Lisbono, 28 de julio- 4 de aŭgusto 2018. HEF partoprenis per salutado en la inaŭgura sesio, en la Movada Foiro kie ĝi montris siajn aktivadojn kaj per aliaj instituciaj agadoj.

**-Planataj de HEF**

**4.9**. En la Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio kiu okazis en majo, la estraro informis pri la decido elekti Malagon kiel sidejon de la 78a Hispana Esperanto-Kongreso. Andaluza Esperanto-Unio komencis zorgi pri la organizado, kaj profitos la okazigon de la 71a jara Kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), en datoj parte koincidaj, tiel ke eblos profiti la sinergiojn inter ambaŭ renkontoj.

**5. INSTITUCIA KUNLABORO**

**5.1.** La junulara sekcio partoprenis en projektoj subvenciataj de la Eŭropa Unio, kune kun TEJO kaj aliaj junularaj asocioj, konkrete en projekto por favori genran egalecon inter la junularo nomata FEJ – Florigu Egalecon inter Junuloj (angle FEY, *Fostering Equality in Youth*).

**5.2.** Hispanaj esperantistoj estis reprezentataj ĉe KAEST (Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko), en Slovakio en oktobro, per prelegoj de Carlos Spínola, el Malago kaj Carlos Pesquera el Santandero. Ankaŭ partoprenis du junuloj, William Guerrero kaj Irene Spinola.

**5.3** HEF kunlaboris en la Eŭropa Jaro de Kultura Heredaĵo, dediĉante al tiu afero diversajn aktivadojn, inter kiuj la kongresoj okazintaj en julio en Madrido. HEF akiris de la Ministerio pri Kulturo la permeson utiligi la eŭropan logoon dizajnitan por tiu celo.

**5.4.** HEF kunlaboris kun la Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED – Universidad Nacional de Educación a Distancia) kaj la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI) en organizado de universitata simpozio "La kultura heredaĵo de Esperanto" en sidejo de UNED la 26-an kaj 27-an de julio.

**5.5.** La 9an de junio la urbo Guardamar del Segura (Alikanto) omaĝis la forstan inĝenieron kaj esperantiston Ricardo Codorníu y Stárico, per ekspozicio pri li kaj lia verko, kaj per la inaŭguro de Placeto Ricardo Codorníu Stárico kaj Rondvojo Esperanto. Ĉeestis, krom la lokaj aŭtoritatoj, prafamilianoj de Ricardo Codorníu kaj la Grupo Esperantista de Guardamar kaj aliaj esperantistoj de la provinco.

**5.6.** La gimnazio Almenara de la urbo Vélez-Málaga (provinco Malago) sukcesis akiri la aprobon de projekto nomata "Esperanto Komuniko" fare de la Eŭropa Programo Erasmus Plus. La projekto komenciĝis en septembro kaj daŭros 24 monatojn, dum kiuj skipo de ses instruistoj de la mezlernejo Almenara lernos la bazajn aspektojn de Esperanto kaj vojaĝos al Hungario, Litovio, Italio, Francio kaj Grekio, por disvolvi la novigajn metodojn ebligontajn plibonigi kaj akceli la lernadon de lingvoj pere de Esperanto.

## 6. ELDONADO

Dum 2018 HEF ne eldonis propran materialon. HEF kontribuis en la disvastigo de libroj rilataj al la hispana kulturo.

## 7. DISVASTIGO (PRELEGOJ KAJ PREZENTOJ)

**7.1**. HEF kunlaboris en la prezentado, la 12an de marto, de la libro de Jaume Grau Casas, esperantigita kiel *Tagoj kaj ruinoj,* en la kulturcentro Blanquerna de Madrido.

**7.2**. La 17an de aprilo, okazis prelego, organizita de Asocio GEFREMA, pri "Esperanto kaj esperantistoj dum la hispana interna milito", kiun la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio prezentis en la Biblioteko Iván de Vargas de Madrido.

**7.3**. La 20an de aprilo la klubo Madrida Esperanto-Liceo (MEL), estis invitita partopreni en la "Nokto de la Libroj", organizita de la registaro de la Madrida Regiono. Oni prezentis, la tradukon al Esperanto de antologio de poemoj de la granda hispana poeto Miguel Hernández, kiun Hispana Esperanto-Federacio eldonis okaze de la 75a datreveno de la morto de la poeto.

**7.4**. Tradicia legado de *Don Kiĥoto* dum la Internacia Tago de la Libro (23a aprilo) en Madrido (Círculo de Bellas Artes): du esperantistoj legis paragrafojn de la esperanta traduko de la verko.

**7.5**. La 29an de aprilo, sur la madrida placo Olavide okazis publika omaĝo al la hispana poeto Vicente Aleixandre, elstara membro de la t.n. Generacio de 1927, Nobelpremiito pri literaturo en 1977. La omaĝo konsistis en publika deklamo de poemoj ĉu de Aleixandre, ĉu de aliaj liaj samtempuloj. La organizantoj proponis al Miguel Fernández deklami ambaŭlingve (hispane-esperante) tiuspecan poemon.

**7.6**. La vicprezidanto de la grupo Liberanimo, Eduardo Dolz, paroladis pri Esperanto en mezlernejo "Segundo de Chomón" de la aragona urbo Teruelo, en monato junio.

**7.7.** La 26an kaj 27an de septembro, okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj, la aragona esperantista grupo *Frateco* organizis prelegon kaj praktikan studrondon pri "Esperanto kiel helpa lingvo por faciligi la internacian komunikadon", en la Centro por Instruado de la Ŝparkaso CAI de Zaragozo.

**7.8.** La 28a de septembro, en Madrido, la Federacio estis invitita de la organizaĵo grupiganta la oficialajn lingvoinstitutojn, EUNIC, partopreni unu el ties aktivadoj, tiel nomata "Speak dating", konsistantan en serio de tabloj, ĉe kiuj, dum nur kvin minutoj, establi kontakton kun pluraj linvoj, inter kiuj ankaŭ Esperanto. Tio okazis en la sidejo de la Goethe-Institut.

**7.9.** La urbo Cheste (Valencilando) gastigis la 22an de septembro Festivalon de Lingvoj de la Mondo, organizitan de la Urbestraro kaj la loka esperantista grupo *Lumradio.*

**7.10.** La 22a kaj 23a de septembro, en la kultura centro “Casa del Reloj”, de Madrido, la loka esperantista grupo Madrida Esperanto-Liceo partoprenis la Foiron pri Socia Ekonomio. La Liceo disponis je informa budo, en kiu ĝi informis pri Esperanto. Ankaŭ oni organizis informan debaton pri “La lingvodemando en la internacia komuniko”.

**7.11.** En oktobro okazis en Zaragozo kunveno de aragonaj esperantistoj, kun publika prezentado pri Esperanto en la librejo “La Pantera Rossa”, pri kiu zorgis Pablo Conesa, de *Frateco*, kaj Alberto Granados, de *Liberanimo*. Tiun saman tagon aperis en la regiona ĵurnalo *El Periódico de Aragón* intervjuo kun Alberto Granados.

**7.12**. La 26a de novembro, la prezidanto de HEF, Jose Antonio del Barrio, prelegis pri “Esperanto en la Dua Respubliko, en prizono kaj en ekzilio” en la sidejo de UNED nomata Escuelas Pías.

**7.13.** La 29a de novembro, profesoro Roberto Garvía, de la Universitato Carlos III, paroladis pri “Katolikismo kaj Esperanto; konverĝoj”, sine de seminario “Tito Brandsma, atestanto de espero”.

## 8. EKSPOZICIOJ

**8.1**. Inter la 2a kaj la 28a de februaro estas montrata en la kulturdono de Guardamar del Segura (Alikanto) ekspozicio pri Esperanto, per la paneloj kreitaj de Hispana Esperanto-Federacio, plus du speciale kreitaj por tiu ĉi ekspozicio, pri Ricardo Codorniu, pioniro de Esperanto en Hispanio.

**8.2**. Dum la du unuaj semajnoj de aprilo eblis viziti ekspozicion pri Esperanto en la Ŝtata Publika Biblioteko de Las Palmas de Gran Canaria, organizita de la Grupo Esperantista de Gran Canaria.

**8.3**. Fine de aprilo estis muntita ekspozicio pri Esperanto en la lernejo por plenkreskuloj Mercè Rodoreda de la urbo Ilico (Elche / Elx), ene de aktivado por la paco organizita de la asocio *Associació Veïnal del Raval d'Elx*. La 26an de aprilo oni organizis informan prelegon kaj fulmkurson pri Esperanto.

**8.4.** Dum la Kongresoj en Madrido en julio oni montris ekspozicion pri Esperanto en la Fakultato pri Homsciencoj de la UNED. HEF aktualigis la panelojn uzitajn, kaj parte ŝanĝis la dizajnon.

**8.5.** Inter la 15a kaj 25a de oktobro eblis viziti ekspozicion pri Esperanto, en la Fakultato pri Homsciencoj de la kampuso de Cantoblanco de la Aŭtonoma Universitato de Madrido.

**8.6.** Inter la 15a kaj 22a de decembro estis montrita ekpozicio pri Esperanto en la sidejo de la municipa oficejo de la kvartalo Loranca, en la urbo Fuenlabrado, Madrido. Ĝi estis akompanata de inaŭgura prelego, kiun gvidis Jose Antonio del Barrio, prezidanto de HEF, Isidoro Ortega, prezidanto de la ĵus kreita loka grupo Fuenlabrada Esperanto-Ligo kaj Carmen Seco, magistratano-prezidanto de la distrikto.

**8.7.** De la 26 de decembro ĝis komenco de januaro 2019 prezentiĝis en la kulturcentro Casa de las Sirenas de Sevilo ekspozicio pri la 20 jaroj de tiu centro, la instruado tie de Esperanto dum 15 jaroj, kaj la historio de Esperanto en Sevilo.

**9. AMASMEDIOJ**

**9.1**. La gazetara servo de HEF sendis 6 gazetarajn komunikojn, pri aferoj diversaj, inter alie: prezentoj de libroj, Esperanto-kongresoj en Hispanio kaj Zamenhof-Tago.

**9.2**. Sekve al tiuj komunikoj kaj aliaj agadoj, aperis dum 2018 ĉirkaŭ 80 aludoj, notoj aŭ artikoloj pri HEF aŭ pri Esperanto en ĵurnaloj (kaj paperaj kaj retaj). Kelkaj el tiuj aludoj aperis en naciaj ĵurnaloj.

**9.3.** Speciale abunda estis la apero de informoj rilataj al la IJK en Badaĥozo. Dum tiuj tagoj aperis diversaj raportoj kaj intervjuoj al junularaj aktivuloj. Sekve de ĝi aperis kompleta kaj bone disvastigita raporto en ĵurnalo *El País*.

**9.4.** Sekve al agadoj de la lokaj grupoj, aperis informoj pri Esperanto aŭ ties aktivadoj en lokaj kaj regionaj amaskomunikiloj. Indas substreki la sukcesojn de la grupoj de Teruelo kaj Guardamar del Segura. La 10an de februaro, la Eŭska Televido (ETB) elsendis ampleksan raporton pri Esperanto, el kiu parto estis registrita en la sidejo de la Esperantista Grupo de Bilbao kaj krome estis intervjuitaj Aitor Arana kaj Eduardo Larrouy.

**9.5.** Aperis multnombraj informoj en komunikiloj pri la komenco de la kurso de Esperanto en la universitato UNED.

## 10. ALIAJ KULTURAJ AKTIVAĴOJ

10.1. En januaro oni kunmemoris la 25an datrevenon de la forpaso de Juan Régulo Pérez, la ĉefa eldonisto de libroj en Esperanto meze de la pasinta jarcento, kaj Hispana Esperanto-Federacio tion memoris per prelegaro omaĝe al lia figuro, fare de la prezidanto de la Federacio, José Antonio del Barrio, kaj de la poetoj Miguel Fernández kaj Jorge Camacho.

Ankaŭ en Granda Kanario la loka grupo organizis omaĝon dum la kunveno de la grupo.

**10.2.** Dum la Universala Kongreso de Lisbono, oni anoncis la nomumon de tri novaj Honoraj Membroj de Universala Esperanto-Kongreso (UEA), inter kiuj la iama prezidantino de Hispana Esperanto-Federacio, María Rafaela Urueña Álvarez. Krome, en la ferma ceremonio de la kongreso oni disdonis 8 diplomojn pri Elstara Agado, el kiuj unu estis aljuĝita al la nuna prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio.

**10.3**. Du membroj de HEF, la elstaraj verkistoj kaj tradukistoj Miguel Fernández kaj Miguel Gutierrez Adúriz plu aktivas kiel Prezidanto kaj Sekretario, respektive, de la skipo de gvidantoj de la Belartaj Konkursoj de UEA.

**(Originalo subskribita de la Sekretario Águeda Biurrun)**

# DOKUMENTOJ ALVENITAJ AL LA BIBLIOTEKO 2018

Dum la jaro 2018 eniris la bibliotekan katalogon sekvaj dokumentoj:

*Anonima donacinto*:
*Beletra almanako (N. 30).* Mondial, 2017
*Beletra almanako (N. 31).* Mondial, 2018
*Kantas Miŝo Zdravev* [Disko]. Balkanton, ca. 1970
Heckler, Antono. *Arthistorio*. Literatura Mondo, 1934
Stieger, Anton. *Junaĝo : pripensindaj rakontoj*. Steffel, 1946
Molnár, Francisko. *La knaboj de Paŭlo-strato*. The Esperanto Publishing Co., [ca. 1937]
Rimanto, Nenjo. *ABC libro*. The Esperanto Publishing Company, [ca. 1955]
*Petro : kursa lernolibro por laboristoj*. S.A.T., 1939
Silva, Agostinho da. *La prahistoria arto*. Portugala Eldona Rondo, 1947
Silva, Agostinho da. *Historio de nederlando*. Portugala Eldona Rondo, 1948
Norbert, Alois. *Senhalte al la celo!*, Tramondo, 1946
Dro-Benson. *Universala esperantistigilo. Unua leciono*. Benson School of Esperanto, [1925]
Veenendaal-Bouwes, E. van. La juna vivo : internacia Esperanto-lernolibreto. La Juna Vivo, [ca. 1936]
*Plena vortaro de Esperanto. Suplemento*. [Sennacieca Asocio Tutmonda], 1954
*Plena vortaro de Esperanto*. Sennacieca Asocio Tutmonda, 1947
*Reglamento de la Federación Española de Esperanto*. Hispana Esperanto-Federacio, 1966

Donacinto: *Jorge Camacho*
Iannacone, Amerigo. *Noveloj*. La Kancerkliniko, 2017
García Márquez. *Cent jaroj da soleco*. Mondial, 2015
Seifert, Jaroslav. *Panjo*. Eldona Sekcio de Slovenia Esperanto-Ligo, 1960
Brodskij, Iosif. *De nenie kun amo*... Impeto, 2001
*Tanaka memorando*. Orienta Kuriero : Voĉoj el Oriento, 1938
Urmuz. *Paĝoj bizaraj*. Bero, 1998
Tibulo. *Elegioj*. VoKo, 1998
Kartezio. *Diskurso pri la metodo*. Fonto, 1985

Donacinto: *Familio de Rafael Manchado*
*Persona arkivo de Rafael Manchado : korespondaĵoj (1951-1967)*
*Todo el esperanto por 15 céntimos.* Iberia Esperanto-Servo, [ca. 1935]
*Linguaphone conversational course Esperanto*. Linguaphone Institute, [ca. 1929]
Auld, William. *Paŝoj al plena posedo*. Heroldo de Esperanto, 1973
*Leteroj de Mituisi Kiyosi*. Gaja Omnibuso, 2017

Donacinto: Irek Bobrzak
Dobrzayński, Roman. *Bona Espero : idealo kaj realo* [K-Disko]. Varsovia Vento, 2013

Donacinto: *Ricardo Biurrun*
Marx, Karl. *La interna milito en Francio (1871)* : (la Pariza Komunumo). Mondial, 2005
Neira Vilas, Xosé. *Memoraĵoj de kampara knabo*. Mondial, 2017

Donacinto: *Félix Jiménez Lobo*
*Kiel dono de la mano. Volumo dua*. Związek Literatów Polskich, 2013
Bahaismo kaj *Esperanto*. Bahaa Esperanto-Ligo, 2009

Donacinto: *Peter Baláž*
*Avantaĝoj kaj obstakloj de moderna komunikado*. Espero por E@I, 2017
*Arkivoj kaj bibliotekoj : kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon*. Espero por E@I, 2015

Donacinto: *Brazila Esperanto-Ligo*
Lima, Jason Gonçalves de. A tradução de "A bagaceira" para o *Esperanto*. Temática Editora, 2017
Zamenhof, L.L. O fundamento do Esperanto. Brazila Esperanto-Ligo, 2015

Donacinto: *Marija Belošević*
Marulić, Marko. *Judita. Libro unua*. Hrvatski esperantski savez, 2018
*Preĝlibreto : sanktulo de la tuta mondo*. Hrvatski esperantski savez, 2018
Prosenjak, Božidar. *Sovaĝa ĉevalo*. Hrvatski esperantski savez, 2018
Borčić, Lucija. *Post la naŭdekaj : notoj el maljunulejo*. Hrvatski esperantski savez, 2018

Donacinto: *Pola Esperanto-Asocio*
*Konferenco okaze de 100. mortodatreveno de Ludoviko Zamenhof*. Polski Związek Esperantystów, 2017

Donacinto: *Mireille Grosjean*
*Mozi*. Zaozhuang-a Universitato, 2017

Donacinto: *André Grossmann*
*De Kārlis ĝis Carlo*. Espéranto France-Est, 2016
*Li ne iĝis profeto en sia lando (Francio)..., sed eminenta esperantisto en Zagrebo (Kroatio)*. Espéranto-France Est, 2017

Donacinto: *José María Salguero*
*Amikejo*. Mousse Publishing, 2012

Donacinto: *Ana Manero*
*Simpozio : la kultura heredaĵo de Esperanto, Madrido, 26-27 julio 2018*. [ILEI], [2018]

Donacinto: *Manuel Parra*
Dobrzayński, Roman. *Bona Espero : idealo kaj realo*. Stano Marček, 2008

# "BELARTA RIKOLTO 2018"

La premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj de UEA 2018 estas alireblaj libroforme danke al partnereco inter UEA kaj la eldonejo Mondial, kiu aperigis ilin sub la titolo "**Belarta rikolto 2018**".

La 124-paĝa volumo enhavas i.a. la 10 premiitajn tekstojn, la "Raporton de la Prezidanto" de la Belartaj Konkursoj kaj la "Skripton de la ceremonio de disdono de la BK-premioj 2018", verkita de Miguel Fernández.

Eblas aĉeti papere ĉe UEA: http://katalogo.uea.org/index.php?inf=9688; kaj elektronike ĉe Google Play: https://play.google.com/store/books/details?id=QTOGDwAAQBAJ. La serio ekde 2013 troviĝas en nia Katalogo: http://katalogo.uea.org/katalogo.php?retrovo=belarta+rikolto&am! p;kondicho=chio&trovu=Trovu+en+la+reta+katalogo

Ĉerpo de la raporto de Miguel Fernández diras: "En la nova subbranĉo Mikronovelo oni ricevis 38 verkojn ĝenerale alte aprecitajn de la responda juĝkomisiono. Kia ĝojo konstati, ke ili, kune kun 7 monologoj kaj 90 laboroj partoprenintaj en la kutimaj branĉoj, konsistigis, sume, kun konsiderinda diferenco, la plej grandan nombron da konkursaĵoj ( 135 entute ) ricevitaj en ajna el la Belartaj Konkursoj okazintaj en la lastaj 30 jaroj! Ja simila sukceso en 2019, krom konfirmi ĝojigan kreskon de la nombro da partoprenantoj, prezentus grandan paŝon por la definitivigo de la novaj subbranĉoj ene de BK".




La Belartajn Konkursojn subtenas Belarta Fondaĵo. Pro tio UEA varme invitas donacemulojn kontribui. Manierojn mondonaci al tiu celo vi trovas ĉe: https://uea.org/alighoj/donacoj aŭ https://uea.org/asocio/fondajhoj.

**Gazetaraj Komunikoj**

# PLIAJ EKSPOZICIOJ PRI ESPERANTO



La ekspozicio pri Esperanto pretigita de Hispana Esperanto-Federacio kaj renovigita en julio 2018 plu vojaĝas al diversoj lokoj de Hispanio. En februaro ĝi atingis la provincon Alikanto.

Inter la 7a kaj 15a de februaro ĝi estis elmontrita en la Universitato Miguel Hernández de la urbo Elche (Elx/ Ilico), en t.n. espacio ECO de la konstruaĵo Altabix, danke al la klopodoj de nia ano Antoni Verdú.

Poste ĝi vojaĝis al najbara Alikanto (Alicante/Alacant), sub iniciato de José Miguel Bernabeu. De la 18a de februaro ĝis la 8a de marto eblis ĝin viziti en la Lernejo por Plenkreskuloj F. Giner de los Ríos, strato Doctor Clavero, 4. (vidu apudan foton)

Pliaj ekspozicioj estas programataj por la venontaj monatoj. Ni memorigas ke la paneloj troviĝas je la dispono de la grupoj kaj aktivuloj deziranbtaj informi pri Esperanto en siaj urboj, kaj ke HEF eĉ pagas la eblajn kostojn pri transporto kaj muntado. Vi povas peti al HEF dosieron kun informoj pri ĝi, kaze ke vi deziras konvinki respondeculojn de kulturaj aŭ edukaj institucioj pri tiu iniciato.

Du aliaj pli specifaj ekspozicioj estis montrataj respektive en Sevilo kaj Teruelo.

En la kulturcentro *Casa de las Sirenas* de Sevilo, de la 26 de decembro ĝis komenco de januaro 2019, prezentiĝis ekspozicio pri la 20 jaroj de tiu centro, la instruado tie de Esperanto dum 15 jaroj, kaj la historion de Esperanto en Sevilo.


EL T Diario
Diario de Teruel
Cultura y sociedad

**Esperanto y anarquismo, el binomio por la unidad fraternal**

CGT y Liberanimo organizan una exposición sobre la lengua de Zamenhof

La ekspozicio en Teruelo estis tiu pretigita antaŭ kelkaj jaroj de la sindikato CGT, pri Esperanto kaj anarkiismo, jam montrita en aliaj okazoj en aliaj urboj. En tiu ĉi okazo la sindikato, kun apogo de la loka grupo Liberanimo, programis krome du prelegojn: konkrete la 18an de februaro Alberto Granados parolis pri "Esperanto, lingvo facila kaj neŭtrala" kaj la 20an la historiisto Serafín Aldecoa pri: "La unuaj esperantistoj de Teruelo". La lokan ĵurnalon Diario de Teruel informis dum tiuj tagoj pri la okazaĵo, kaj speciale la 20an per tutpaĝa artikolo pri Esperanto kaj ĝia rilato al anarĥiismo.

## EN LA RETO
## RETEJO EN FACILA ESPERANTO

En januaro ĉi-jare aperis nova retejo de UEA. Ĝia nomo estas uea.facila, kaj ĝi estas videbla ĉe: http://uea.facila.org. Ĝia celo estas prezenti la Esperanto-movadon al novaj esperantistoj per facila lingvaĵo. Tial ĝi estas taŭga por lernantoj, sed espereble ĝiaj mallongaj novaĵartikoloj povus esti interesaj ankaŭ por pli spertaj esperantistoj.
La artikoloj konsistas ĉefe el novaĵoj kaj informoj pri la Esperato-movado, sed estas ankaŭ ĝeneralaj legaĵoj, informoj pri filmetoj kaj aliaj materialoj troveblaj tra la reto, kalendaro de estontaj kunvenoj kaj aliaj. Estas grave, ke la legantoj ne nur pasive legu, sed sentu sin parto de la afero, do ili havas eblecon komenti sub la artikoloj, prezenti sin en la paĝo "Niaj legantoj", kaj sendi mallongajn raportojn kaj fotojn pri lokaj agadoj.

La facila lingvaĵo de la artikoloj estas bazita sur la iama vortlisto de la revuo *Kontakto*, nun reviziita. Aldonitaj vortoj rilatas plejparte al komputado kaj Interreto, kaj estis forigitaj kelkaj vortoj, kiuj ne ofte estas bezonataj en tia retejo. La reviziita vortlisto troviĝas ĉe: https://uea.facila.org/vortlisto/.

La ĉefredaktoro estas Anna Löwenstein, kaj jam formiĝis tuta reto de kunlaborantoj. Emilio Cid, estrarano de UEA, subtenis la projekton ekde la komenco, kaj estas grave mencii la kontribuon ankaŭ de ESF, kies subvencio necesis por ricevi la helpon de profesia programisto.
Aperos ankaŭ beletraĵoj, Notu ke la unuaj estas du mallongaj poemoj de Liven Dek.

### RETEJOJ POR AKTUALAJ FILMOJ KAJ RENKONTIĜOJ

Estis ĵus lanĉita nova retejo, kiu ebligas sekvi la plej lastajn filmojn en Esperanto prezentitajn en la reto, plej ofte en Jutubo (Youtube). Ĝia nomo estas Tubaro, kaj ĝi estas alirebla en la adreso https://tubaro.aperu.net. Ĝi aŭtomate prenas la lastajn filmojn aperintajn en Jutubo kaj diskonigas ilin en esperanta etoso. Baldaŭ aliaj videoplatformoj estos aldonitaj. Espereble ĝi estos utila por diskonigi nekonatajn sed interesajn kanalojn. Ĉefa iniciatinto estas nia sevila amiko Pablo Busto, respondeculo ankaŭ de aliaj videokanaloj, kiel Babelo Filmoj kaj aliaj iniciatoj.

Alia interesa retpaĝo ĵus lanĉita estas http://eventaservo.org, retejo kiu montras la venontajn eventojn okazontajn en Esperantujo. Ne nur kongresojn kaj gravajn renkontiĝojn, kiu ankaŭ estas montrataj en la retejo de eventoj.hu, sed ankaŭ renkontojn de grupoj, specialaj kunvenoj, ktp. Bv konsulti, diskonigi, kaj mem aktualigi se vi organizas unu tian renkonton.

**(vidu aparte intervjuon al Pablo Busto, paĝo 26)**

# DU PREMIOJ POR AMIKOJ DE ESPERANTO




María Villalón - La pluvo - Esperanto

Dum la pasintaj semajnoj du neesperantistoj kiuj plurfoje montris sian apogon al la internacia lingvo aperis en la novaĵservoj.

La kantisto María Villalón estis la venkinto de la tre spektata televida muzikkonkurso nomata "Tu cara me suena" de la televidstacio Antena 3. Ni memorigas ke María brile koncertis en la 73a Hispana Kongreso de Esperanto en Arundo (Ronda) en 2014, kie ŝi kantis du pecojn en Esperanto: *La pluvo* kaj *Viviga pluvet'*.

Aliflanke, la filmo "Roma" de Alfonso Cuarón, ricevis la Oskarpremiojn al la plej bona filmo neanglalingva kaj al la plej bona reĝisoro. La filmo estis produktita de la kompanio "Esperanto Filmoj", tiel alnomita de Alfonso Cuarón, kiu plurfoje montris sian simpation al Esperanto.







Gratulon al ambaŭ!

---

# NI DEBATU LA LINGVAN SITUACION EN EŬROPO

Komence de la jaro la estraro fiksis prioritatojn por la agado de la asocio en 2019, kaj inter ili proponis fokusiĝon pri la lingva situacio en Eŭropo. Tiu estos interalie la gvida temo de la 78a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝos en Malago inter la 1a kaj 5a de majo. Ni ne forgesu ke la renkonto okazos preskaŭ koincide kun la kampanja periodo por la Eŭropa Parlamento kaj kelkajn semajnojn post la (supozebla) eliro de Britio el la Eŭropa Unio.

Ĉu sencas ke la angla lingvo konservu la privilegian rolon kiun ĝi fakte tenas en la institucioj de la EU? Ĉu konserviĝos la nuna lingva reĝimo, karakterizita per teoria egaleco inter la oficialaj lingvoj, sed kun klara praktika dominado fare de tiuj majoritataj, establita per la forto de la faktoj? Kiun favoras tiu fakta reĝimo? Ĉu la nuna malkontento pri Eŭropo en multaj landoj kaj tavoloj rilatas al tiu sistemo de dominado, pri kiu la lingvoj estas plua manifestiĝo? Ĉu neŭtrala internacia lingvo povus havi rolon en la nova lingva reĝimo kiun oni nepre devos fiksi post la Briteliro?

En la Kongreso ni disponos je ŝancoj por debati pri tiuj temoj, por kio ni disponos, interalie, je la ĉeesto de Seán Ó Riain, prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio.

Krome, pri ĉio ĉi oni devus paroli en la venontaj monatoj, kaj Hispana Esperanto-Federacio deziras esti parto de tiu ĉi debato, prezentante la rolon kiun Esperanto povus ludi kiel neŭtrala komunikilo kaj kiel helpa ilo en la interŝtata komunikado. Dum tiu ĉi jaro 2019 ni planas organizi diversajn aktivadojn por konsciigi la ĝeneralan publikon kaj specife la politikistojn, ke alia lingva sistemo eblas en Eŭropa Unio, kaj ke nun estas la momento ĝin diskuti, kaj ne devigi per la forto de la faktoj.

Ni invitas la lokajn grupojn kaj aktivulojn kontribui al tiu iniciato. Tiu ĉi jaro estas la adekvata levi la demandon pri pli justa lingva politiko en Eŭropo, kaj, ene de nia modesteco, ni pensas ke ankaŭ Esperanto devus havi ian rolon.

## KONSULTIĜO DE LA EŬROPA OMBUDSMANO PRI LINGVOJ

Meze de februaro aperis resumo de la konkludoj de la raporto pri la konsultiĝo proponita en julio pasintjare de la Eŭropa Popoldefendanto (Ombudsmano) pri la uzo de lingvoj en la institucioj de Eŭropa Unio.

La raporton eblas legi en la retejo de la ombudsmano en la hispana kaj ceteraj oficialaj lingvoj. Ni rekomendas ties legadon, interalie ĉar evidentiĝas intereso de pluraj respondintoj pri la uzo de Esperanto kiel ebla lingva perilo en Eŭropa Unio. Fakte montriĝas pli da favoro al Esperanto inter la respondoj ricevitaj ol al aliaj eblaj *lingvafrankaoj*.

La raporton de la Popoldefendanto ne havas devigan povon en la institucioj de la Eŭropa Unio, kaj do ili restas kiel rekomendoj kiujn tiu institucio povas havigi al aliaj instancoj. Tamen, la respondo montras la evidentan intereson kiun la lingva reĝimo de la Unio havas por ties civitanoj.

# TRIOPA KONGRESO-MALAGO 2019



De antaŭ kelkaj monatoj, mi jam forgesis kiom da ili, mi kunlabore kun aliaj kolegoj de Malago, aranĝas la 71-an IFEF Kongreson kaj samtempe du pliajn, t.e. la 78-an HEK kaj la 21-an AEK, pro tio ni nomas «la Triopa Kongreso» la internacian eventon okazonta la venontan majon, de la 1-a ĝis la 9-a en la alloga kaj historia Dioceza Domo de la Seminario de Malago. La Kongresejo staras sur monteto de kie oni kontemplas belajn vidindaĵojn kaj densan pinarbaron dum niaj pulmoj spiradas puran aeron trinkante sukon aŭ glason da kvo aŭ, kial ne? malvarman bieron, ĉar nia celo estas okazigi neforgeseblan eventon kaj mi certas ke ĝi sukcesos. Nur mankas aliĝintoj, kvankam ni jam atingis pli ol 140, nia celo estus 200, ĉar estas loko por ĉiuj kaj programeroj diversaj pri variaj temoj, krom amuzaĵoj, flamenko, hispana muziko, dancado, teatraĵo, baza kurso de E-o, KER ekzamenoj, ekskursoj, bongusta menuo, promenadoj sub la plej bela blua ĉielo en la mondo, ĉar Malago estas konata kiel La Urbo de la Paradizo kaj ni rajtas ĝui la belajn monumentojn, muzeojn, parkojn kaj strandojn promenante en bona etoso kun geesperantistoj tra la urbocentro, kiu estas aranĝita specife por piedirantoj, ktp.







Laŭ la programo ni spertos "lirikajn momentojn" per la poezio kaj voĉo de Miguel Fernández, kiu ĉiam surprizas nin per novaj poemoj kaj kantoj. Pluraj prelegoj pri Andaluzio, ĉefe pri Malago kaj la historio de Esperanto en nia urbo. Kompreneble la ĉefa programo estas Fervojo, depende de via elekto vi povas ĉeesti la plej interesajn, ĉar estas programeroj laŭ ĉies plaĉo.

La plej interesa afero de nia Triopa Kongreso estas la Kongresejo mem, ĉar la plimulto gastos ĉe ĝiaj komfortaj ĉambroj kaj la problemo vekiĝi frue por alveni akurate ne ekzistas, ĉar la distanco estas nula kaj mi certas ke la ideo estas bona, ĉar la plimulto ĝuos dum kelkaj tagoj neforgeseblan eventon.

Ne pripensu tro, la tempo rapide pasas kaj la okazo estas unika, se vi havas libertempon, vi devas profiti la okazon ĉeesti la internacian eventon laŭritme kun la esperanta etoso kaj la vetero de nia urbo kaj ĉirkaŭaĵoj, ĉar estas interesa listo da ekskursoj al Antekero, Ronda, Zafarralla, Botanika Ĝardeno, Granado, Kordovo, kaj se vi volas navigi per ŝipo, dum la postkongreso vi profitu la okazon viziti Afrikon, kie la urboj Tanger, Ceuta, Tetuan, Asilah kaj Ĉaouen, atendas nin en luksaj vestaĵoj kaj komforta hotelo.





Mi ne certas kiam aperos ĉi artikolo, sed mi esperas ke fine de marto aŭ komence de aprilo, kiam ankoraŭ restos minimume du semajnoj por aliĝi kaj partopreni la historian Triopan Kongreson de Esperanto.

Ángel Arquillos

# Provizora PROGRAMO de la 71-a IFEF, 78-a HEF kaj 21-a AEU kongresoj

## *HEF kongresa temo*: "Lingva situacio en Eŭropo"

## KER-ekzameno: sabato 4-a de majo, kun Katalin Kovats!!

| | | |
|---|---|---|
| Merkredo 01.05 | 10.00 – 13.00<br>15.30 – 19.30<br>15.30 – 19.30<br>21.00 – 22.30 | *Akceptado / Informado*: *alvena tago por HEF*<br>Urbovizitado **V1**-Malago (piede kaj per urba buso), (1-a grupo)<br>Akceptado / informado, Libroservo<br>Interkona vespero |
| Jaŭdo 02.05 | 08.00 – 20.00<br>09.00 – 18.00<br>09.00 – 09.30<br>09.30 – 10.45<br>09.30 – 11.00<br>11.00 – 13.00<br><br><br><br><br>16.00 – 17.15<br>17.30 – 19.30<br><br><br><br>21.30 – 23.30 | HEF - turisma programo**: A1** – Granado, Alhambro<br>*Akceptado / Informado, Libroservo*<br>**Bonveno kaj prezento de la Hispana Kongreso**<br>HEF-kunveno: Organizado de HEF dum venontaj jaroj<br>E-kurso por komencantoj. (Fátima)<br>*Prelegoj.*<br>- Komuna modelo: **(**KOMO): Esperantistiĝo disvolviĝe: ekkono, motivoj, bariloj (Dennis Keefe)<br>**-** Malago, pionira urbo en Esperantujo (Juan García del Río)<br>Tagmanĝa paŭso<br>HEF-kunveno: propagando kaj disvastigo de Esperanto je loka nivelo<br>*Prelegoj:*<br>- Ángel Arquillos prezentas sian lastan libron "LA FONTANO DE L'SORTO"<br>-Blas Infante kaj Esperanto (José María Rodríguez)<br>Vespermanĝa paŭzo<br>Arta kaj distra programo<br>*Arta kaj Andaluzia etoso/*Arte y color andaluz, de Pedro Carrillo |
| Vendredo 03.05 | 09.00 – 18.00<br>09.30 – 11.00<br>09.00 – 12.15<br><br><br><br>12.15 – 13.00<br><br><br>15.30 – 19.30<br>16.00 – 19.30<br><br><br><br><br><br>19.30 – 20.30<br><br>20.30 – 12.15<br>21.30 – 23.30 | *Akceptado / Informado: alvena tago por IFEF*<br>E-kurso por komencantoj. (Fátima)<br>*Prelegoj*<br>- Projekto Erasmus+ "Esperanto-Komuniko" (A. Fabián Jiménez)<br>- La angla lingvo en la Europa Unio post la briteliro. (Federico Gobbo)<br>- Kiujn fremdlingvojn oni instruas en EU, (Katalin Kovats)<br>- Diskutrondo: - Lingva situacio en E.U.post Briteliro (Prez.: J. M. Rodríguez. Interv. Seán O'Riain, Federico Gobbo, Katalin Kovats, )<br>*Tagmanĝa paŭzo*<br>Urbovizitado **V1** - Malago (piede kaj per urba buso) (1-a grupo)<br>*Prelegoj,*<br>- Defensa de la Lengua Nacional en la anglicanizada Europa / Defendo de la nacia lingvo en la angle-parolanta Europo ", (Hispane k. esperante) (Dámaso Suárez)<br>- Proponoj por enkonduki Eon en E.U. kiel lingvo por administrado (J. M. Rodríguez)<br>- Ateliero pri mikro-rakontoj, (M.G.Adúriz)<br>- Prezento de kaj pretigado al KER ekzameno, (Katalin Kovats)<br>"Esperanto en el mundo", (en la hispana, malferma agado, div. prelegontoj)<br>Vespermanĝa paŭzo<br>Kunveno de la IFEF Estraro kaj LKK<br>*Arta programo:*<br>- Concerto Málaga: Juan Pablo Gamarro kaj orkestro.<br>- Ciganaj kantoj (Saŝa Pilovic) |

| | | |
|---|---|---|
| Sabato<br>04.05 | 09.00 – 18.00 | *Akceptado/Informado* |
| | 09.00 -- 18.00 | KER-Ekzameno. Konsultu la Horaron |
| | 10.00 – 12.00 | **Solena Malfermo (komuna: IFEF, HEF, AEU)** |
| | 12.00 – 12.30 | *Komuna foto; Gazetara konferenco* |
| | 12.30 – 13.30 | "Mia liriko kaj la muziko", (M. Fernández) |
| | 12.30 – 13.15 | Kunveno de E-instruistoj kaj ILEI-hispana-sekcio |
| | | *Tagmanĝa paŭzo* |
| | 15.30 – 19.30 | Urbovizitado V1 - Malago (piedire kaj per urba buso), (2-a grupo) |
| | 16.00 – 19.30 | *Prelegoj*:<br>- Ĉu E.U. vere havas 24 oficialajn lingvojn? Minoritataj lingvoj en EU (Seán O'Riain).<br>- Sferoj: Sciencfikcio kaj fantasto, (M.G.Aduriz)<br>- Proyecto TUBARO (Pablo Bustos) |
| | 18.30 – 19.30 | AŬKCIO |
| | 18.30 – 19.30 | Kunveno de junaj aktivuloj: Situacio de junularaj asocioj. |
| | | *Vespermanĝa paŭzo* |
| | 21.30 – 23.00 | *Nacia Vespero: Rocío Alba* |
| Dimanĉo<br>05.05 | 09.00 – 09.45 | Venonta kongreso IFEF sinprezentas (Germanio) |
| | 10.00 – 11.00 | HEF- Ĝenerala Kunsido |
| | 10.00 – 11.45 | IFEF - Laborkunsido de la Faka komisiono |
| | 12.00 – 13.00 | Fervojfakaj prelegoj |
| | 10.00 – 12.00 | Esperantanta paroliga sesio, (Sylvain kaj Katalin) |
| | 11.00 – 13.00 | Prelegoj<br>- Esperanto-plaĝo, (Dennis Keefe)<br>- Esperanta Katedro de la Amsterdama Universitato (Federico Gobbo) |
| | | *Tagmanĝa paŭzo* |
| | 15.00 – 19.30 | Urbovizitado **V2** - Malago, botanika ĝardeno (per buso) |
| | 15.00 – 19.30 | Konversacio kurso por progresantoj (Kristin Tytgat) |
| | 15.00 – 17.00 | IFEF . Kunsido de la Faka Komisiono—Prelegoj:<br>- La "AVE" (Hispana Grandrapida Trajno) al La Meko (J.M. Rodríguez)<br>- Prelego de Amigos del Ferrocarríl (Amikaro de la Fervojo) |
| | 17.15 – 18.15 | Ateliero pri arkivado . Manlibro de Jan Niemann |
| | 18.15 – 19.15 | Ateliero pri informadio (kiel krei Vikipedian paĝon) - Laurent Vignau |
| | 19.15 – 19.30 | Oficiala fermo de Hispana kaj Andaluzia kongresoj |
| | | Vespermanĝa paŭzo |
| | 21.00 – 23.00 | Arta Vespero: Vivu la Teatro! (M. Fernández kaj Ana Manero) |
| Lundo<br>06.05 | 09.00 – 13.00 | IFEF - Publika komitatkunsido |
| | | *Tagmanĝa paŭzo* |
| | 14.30 – 19.30 | Duontaga ekskurso D1 – Zafarraya, "Laŭ la spuroj de antikva trajno"; |
| | 14.30 – 19.30 | Duontaga ekskurso D2 – Antequera |
| | | *Vespermanĝa paŭzo* |
| | 21.30 – 23.00 | Arta vespero: Kajto muzikas! |
| Mardo<br>07.05 | 09.00 – 13.00 | Ĉefa fervojfaka prelego kaj aliaj prelegoj:<br>-HYPERLOOP, la morgaŭa fervojo (J. M. Rodríguez)<br>-Veturado tra la interplaneda spaco (Carlos Spínola)<br>- 110-a jariĝo de la fervojista internacia movado.<br>Konversacia kurso por progresantoj (Kristin Tytgat); |
| | 09.30 – 11.30 | Tagmanĝa paŭzo<br>Konversacia kurso por progresantoj (Kristin Tytgat);çç |
| | 15.00 – 18.00 | IFEF-Kunsido de la laborgrupoj, publika |
| | 15.00 – 16.15 | Movadaj aferoj - strategio pri la estonteco de IFEF |
| | 16.30 – 17.45 | Solena fermo de la IFEF Kongreso |
| | 19.00 – 19.30 | Konkluda kunveno de la IFEF estraro kaj LKK |
| | | Vespermanĝa paŭzo |
| | 21.30 – 23.00 | Arta Vespero: Gracia Barboni!. |

| | | |
|---|---|---|
| Merkredo<br>08.05 | 08.30 – 19.30<br><br>21.00 – 22.00<br>22.00 – | **T1** - Ekskurso al Ronda;<br>*Vespermanĝa pauzo*<br>Estrarkusido de IFEF<br>*Ĝisrevida vespero* |
| Ĵaŭdo<br>09.05 | 08.00 – 20.00 | **T2** - Tuttaga ekskurso al Kordovo kaj ĝia Moskeo |
| **Postkongreso (10.05-12.05) - Norda Maroko** | | |
| Vendredo, 10.05 | | Málaga – Algeciras – Ceuta – Tetuán |
| Sabato, 11.05 | | Tetuán – Asilah – Tánger – Tetuán |
| Dimanĉo, 12.05 | - 23:30 | Tetuán – Chaouen – Ceuta – Málaga |

Horaro por la manĝejo:

Matenmanĝo: 7.30 - 9.00 tagmanĝo: 13.00—15.00 Vespermanĝo: 19.30 - 21-00

Duongaste inkludas matenmanĝon kaj vespermanĝon

# NOTO DE LA ESTRARO

La estraro de Hispana Esperanto-Federacio deziras montri publike sian tutan kaj absolutan malaprobon al ĉia perforto, fizika aŭ vorta, kiu povus okazi dum la Kongresoj aŭ aliaj eventoj pri kiu ĝi respondecas.

Krome, en la kunveno de la estraro kiu okazis en Madrido la 20an de januaro 2019 oni decidis proponi al la venonta Ĝenerala Kunveno aldoni al la regularo de la kongresoj la devigon nomumi unu membron de la LKK kiel kontaktulo por atenti la kazojn de agreso aŭ molestado kiuj povus estiĝi. La nomo kaj kontaktomaniero de tiu respondeculo devos klare aperi en la Kongreslibro.

En tiu kunveno estis ankaŭ decidite publikigi tiun ĉi noton pri malaprobo je agresoj en la venonta numero de nia informa Bulteno.

# VIZITO AL SANTANDERO



Komence de januaro la prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio, vizitis la sidejon de Kantabra Esperanto-Asocio en Santandero, kaj kunvenis kun la esperantistoj de tiu regiono. Kolektiĝis ĉirkaŭ dudeko de homoj, kiuj krom babili kaj celebri la novan jaron, povis gustumi belan marcipanan krokodilon kuiritan de Pedro Ullate. Post la renkonto en la sidejo plejparto de la esperantistoj daŭrigis la kunvenon en apudan restoracion.



Krom konstati la bonan staton kaj laboremon de la kantabra asocio, la celo de la vizito estas esplori la eblecon organizi en tiu regiono la Hispanan Kongreson de 2020. Oni nun studas la diversajn eblecojn, pri datoj kaj lokoj, pri kiuj eventuale oni informos en venonta Boletín.

# GASTON-DOKUMENTARO EN HISTORIA ARKIVO




Paco Sanz Gastón estas la nepo de grava pioniro (nome: Emilio Gastón Ugarte) kiu gardis ampleksan familian dokumentaron en kiu enestas materialoj pri la helpo per esperanto por gastigo en Hispanio de aŭstraj infanoj post la Unua Mondmilito. Kaj nun la "Archivo Histórico Provincial de Zaragoza (Provinca Historia Arkivo de Zaragozo) ricevis la Gaston-Dokumentaron. Tio estas grava afero rilate al konservado, organizado de tia informado. Estontece eble povos esti konsultata.

Emilio Gastón Ugarte (1877-1925) estis grava politika figuro kaj elstara esperantisto. Li estis unu el la fondintoj en 1908 de la esperanta societo FRATECO en Zaragozo. Li organizis en Hispanio la akcepton kaj gastigadon de aŭstriaj infanoj post la Unua Mondmilito kiuj restis en malfavoraj kondiĉoj. Karl Bartel estis la esperantisto de Graz (Stirio, Aŭstrio) kiu de tiu loko kunorganizis la aferon post sendo la 15an de januaro de 1920 de alvoko petante helpon. La esperantisma solidareco ekagadis en tiaj komplikaj cirkonstancoj.

Pri tio ekzistis sep grandaj volumoj binditaj (kun leteroj, raportoj, informado diversa) kiu nun estis sendata al menciata arkivo. La nomo de la retejo estas: SIPCA / DARA (Sistema de Información del Patrimonio Cultural Aragonés / Documentos y Archivos de Aragón).

Alvenis 329 geinfanoj. La gastigado okazis inter la jaroj 1920 kaj 1923. Indas memor (ig)i la nomon de la esperantistoj kiuj helpis en tiu projekto. Krom K. Bartel kaj E. Gastón, ni menciu (inter aliaj): Francisco Mañez (Cheste), Jacinto Comella (Vich), Valentín Alavedra (Tarrasa), Roberto Maraury (Huesca), Josę Casanovas (Gerona), José Serrat (Barcelona), Pedro Oriach (Sabadell), Daniel Llorens (Pedralba), Juan Campdelacreu (Manlleu), Julio Belenguer (Teruel) kaj Enrique Aguadé (Reus).

Pri tiu okazaĵo ekzistas diversaj informoj: en libroj de A. Marco Botella ("Analoj", Kroniko de Frateco, Un siglo de esperanto en Aragon), Lurdes Cortès Braña ( kiu faris universitatajn esplorojn), J. Alcalde, B. Tuider ("Antaŭ unu jarcento")...

Krome, parenteze, ni povas substreki ke filino de Emilio aperas kiel unu el la unuaj denaske parolantaj esperantistoj. Nome: Emilia Gastón Burillo (1904-1988). Memorindas ankaŭ aliaj gefratoj kiel Inés (1906-1993), Rafael (1908-1963) Mariano (1914-1999) kaj M. Carmen (1921-2012) . Filo de Rafael estis Emilio Gastón Sanz (1935-2018), alia grava figuro forpasinta pasintjare (kaj alia nepo kiu benis la avon).

Mi volas citi vortojn de la Patronaro pri Helpo al Infanoj: "Nia agado kvankam realigita favore al tiuj kiuj estis sia objekto, ankaŭ profitis al ni, ĉar dank' al ĝi ni ĉiuj kreskis en nia propra estimo, tial ke (...) ni ĉiuj nin sentis kontentaj kaj fieraj pro ĝia efektivigo (...) Ni devas ne forgesi (personon) kaj ilon, sen kies ekzisto ni ne estus povintaj realigi ĝin (...) La ilo estas la lingvo Esperanto, kiu - kvankam ne atentante sian internan ideon- estas perilo dank' al kiu ni sukcesis en nia agado, sen ia malbona interpreto".

**Lorenzo Noguero**

# Tubaro: nova retejo por trovi esperantlingvajn videojn

**"Intervjuo de Libera Folio al Pablo Busto"**



Aperis nova esperanta retpaĝo: Tubaro. Ĝi mem ne proponas novan enhavon, sed per ĝi pli facilas trovi esperantlingvajn filmetojn en YouTube. Rogier Huurman intervjuas por *Libera Folio* la kreinton, Pablo Busto. Li jam estas konata pro siaj kantoj por infanoj, el kiuj *Dek Bovinoj* estas la plej fama. Tubaro aperis en la komenco de februaro de tiu ĉi jaro. Je la momento kiam ni verkas tiun ĉi artikolon, estas pli ol 800 filmetoj en la retpaĝo, el kiuj 550 estas markitaj kiel esperantlingvaj.

*Libera Folio:* Kio estas la celo de Tubaro?

*Pablo Busto:* – Ĉefe, konkeri la mondon, sed unue, ni celas montri filmojn en Esperanto en koncentrita loko. Estas ege malfacile trovi filmojn en Esperanto, la nunaj serĉiloj montras rezultojn laŭ via historio, kaj, kompreneble, ni ĉiuj retumas pli ofte en nia lingvo ol en Esperanto. Do, se iu faras la kutiman serĉon "esperanto", plej eble vi trovos filmojn en via lingvo pri Esperanto, ne esperantajn filmojn.

Kiuj homoj estas malantaŭ Tubaro?

– Estas kelkaj, sed la plej videbla estas mi, la aliaj preferas ne esti publike konataj. Sed honeste, mi pensas ke ĉiu, kiu faras filmon en esperanto estas parto de Tubaro, platformo sen enhavo estas nenio.

Kiel filmetoj aperas en Tubaro?

– Ni celas fari ĉion laŭeble aŭtomate. Ni havas programojn, kiuj serĉas en YouTube per kelkaj ŝlosilvortoj, kaj montras ĉiujn novajn filmojn. Krome ni sekvas kelkajn kanalojn (evildea, muzikumejo, scivolemo…), pri kiuj ni certas, ke 90% el ilia enhavo estas en Esperanto, kaj, eĉ se la serĉilo ne trovas, ajna nova filmo aperos. Kaj por iomete pli certi ni havas ankaŭ liston de blokitaj kanaloj, kiuj estas kutime trovataj, sed ilia enhavo ne rilatas al Esperanto (futbala teamo, muzika grupo el Kostariko, Dancejo el Bonaero…). Pro tio, ke tiu serĉmaniero ne perfektas, ni ebligis ke homoj proponu anonime novajn aŭ malnovajn filmojn, sed tiuokaze, por eviti spamatakon, administranto kontrolas antaŭ publika alŝuto.

Kiom da laboro estis krei la retpaĝon?

– Multe pli ol pensite! Ni komencis antaŭ 1 jaro, pli malpli. Sed ni ne diskonigis ĝin ĝis havi sufiĉe da certeco ke estas ne tre gravaj eraroj en ĝi. Multaj esperantaj retejoj fiaskis pro tro frua publikigo

– (Ridas.) "Dek Bovinoj" montris al mi, ke ekzistas homoj interesitaj pri esperanto, sed ekzistas ankaŭ grava problemo: mankas interligo inter multaj interesaj aferoj. Ekzemple, alia projekto kiun mi partoprenas, "Muzikumejo", ricevas tre malmultajn vizitojn de aliaj esperantaj filmoj, kaj tio simple ne sencas. Tial la decido fari Tubaron. Montri tion kio ekzistas aliloke, sed malfacile troveblas. Estus maleble konvinki kreantojn translokiĝi al nova servo.

Ĉu vi havis problemojn pro maltaŭga enhavo?

– Kompreneble jes, tio estis antaŭvidebla. Ĉirkaŭ 20% de la aŭtomataj trovaĵoj estis maltaŭgaj (komprenu "maltaŭga" kiel "neesperanta" kaj "nerilata" enhavo). Momente ni solvas tion permane, sed ni planas fari aŭtomatan administrilon, kiu faros tion laŭ la raportoj de la uzantoj.

Kiel la montrataj filmetoj estas ordigitaj?

– Kelkmaniere: defaŭlte laŭ ordo de apero en Tubaro. Sed ni ebligas kelkajn aliajn ordigojn: "laŭ la aĝo de la filmo en sia platformo", laŭ la kvanto de komentoj, ŝatoj, kaj la plej interesa, miaopinie, laŭ la lasta komento. Tio ebligas, ke homoj pli facile trovu respondojn kaj reagojn al iliaj komentoj.

Ĉu eblas spekti sinsekvon da filmetoj de la sama kreinto aŭ pri sama temo?

– Ankoraŭ ne. Ni ŝatus ebligi tion, kaj teknike estas sufiĉe facile, sed tio estas iomete tikla temo. Laŭ la kondiĉoj de YouTube, se ni farus tion, la spektaĵoj tra Tubaro ne estus enkalkulitaj de YouTube, kaj ni ne ŝatus "forŝteli" spektojn de kreinto. Ni volas pli esplori la temon por ebligi tion.

Kiujn aliajn funkciojn vi pripensas aldoni?

– Multegajn! La plej grava: ni laboras pri algoritmo pri populareco. Nuntempe Tubaro povas aspekti iomete ĥaosa (malnovaj kaj novaj filmoj miksitaj), kaj ni celas uzi la ĉefan paĝon de aperu.net kiel pli trankvilan kaj malpli ĥaosan paĝon, por ke iom post iom aperu filmoj, sed certigante ian minimumon de kvalito aŭ aktiveco. La unuaj provoj de tiuj algoritmoj komenciĝos post 1 aŭ 2 semajnoj. Ni planas ankaŭ enkategoriigon de filmoj, por helpi la rekomendilon trovi similajn filmojn.

Ĉu videblas iu efiko de Tubaro al la esperantlingva filmetaro?

Dankon pro tia demando, la prej grava afero estas, ke Tubaro estu utila: iomete, jes. De tiam, kiam ni lanĉis Tubaron, neniu el la kanaloj, kiujn mi kunestras, alŝutis novan filmon, do mi ne havas certan mezuron. Por grandaj kanaloj kiel Evildea aŭ Esperanto Variety Show mi pensas, ke Tubaro estas momente sensignifa, sed por malgrandaj aŭ novaj kanaloj Tubaro estas inter 10% kaj 50% de la vizitoj. Sed ni jam rimarkis, ke preskaŭ 50% de la homoj, kiuj spektas unu filmon en Tubaro, spektas alian el niaj rekomendoj. Tio estas multe pli ol la rekomenda proporcio de YouTube ekzemple. En Youtube nur 10% de homoj, kiuj spektas filmon en la kanalo, spektas alian filmon de la kanalo, ili foriras al aliaj rekomenditaj filmoj, kiuj kutime ne estas en Esperanto. Sed ankoraŭ la kvanto da la datumoj estas ne sufiĉe granda por konsideri ilin statistike signifaj.

***Intervjuis Rogier Huurman (Libera Folio)***

# BRILA APERO DE LA IBERA SKOLO EKSTER ESPERANTUJO

***Miguel Fernández***

Pasintjare, en la HEF-oficejo, oni ricevis mesaĝon el la portugallingva poeto Carlos d'Abreu. Per ĝi, li invitis hispanajn E-poetojn partopreni belan projekton: poezian antologion en omaĝo al la poezi-majstro Eugénio de Andrade (1923-2005), la dua (post Fernando Pessoa) plej universala el la portugalaj poetoj. La celo, belega, estis, ke en la antologio aperu poemoj en kiel eble plej diversaj lingvoj parolataj en la Iberia Duoninsulo, inkluzive de Esperanto kiel internacia sintezo de ili ĉiuj. E-poetoj de la t.n. Ibera Skolo (Antonio Valén, Gonçalo Neves, Jorge Camacho, Liven Dek, Miguel Fernández kaj Suso Moinhos), prenis la inviton al la koro kaj sendis poemojn en Esperanto kaj en portugaligo fare de Neves mem. La pasintan januaron aperis la antologio, sub la nomo *O sol é secreto, poetas celebram Eugénio de Andrade* [La suno sekretas, poetoj omaĝas al Eugénio de Andrade]: poemoj de 106 poetoj (inter kiuj troviĝas plej prestiĝaj bardoj) en 8 iberiaj lingvoj plus Esperanto, iberia kaj internacia, kiu, laŭ la nombro da kontribuaĵoj, estis la tria plej uzita en la libro. Cirlulere, Carlos d'Abreu esprimis al la aro da partoprenintoj i.a. sian apartan dankon al la poetoj de la Ibera Skolo, kio honoras nin, sed, eĉ pli interese, ankaŭ la E-poezion. Aliflanke, kulturaj aŭtoritatoj invitis nin partopreni en la ceremonio de prezentado de la antologio, la 19an de Januaro 2019, en la naskiĝ-domo de la poeto. Tial, ke neniu el ni povis tien vojaĝi, ni sendis jenan mesaĝon en la hispana, kiun Calos d'Abreu legis al la ĉeestantaj politikaj-kulturaj aŭtoritatoj:






"La E-poetoj de la t.n. Ibera Skolo, kiuj kontribuis al la apero de *O sol é sekreto*, manifestas, ke tia kontribuo prezentis grandan honoron al ili; bedaŭras, ke ili ne povas ĉeesti la prezentadon de tiu mirinda antologio en la naskiĝ-tago kaj -domo de la admirata majstro Eugénio de Andrade, kvankam ili elkore aliĝas al ĉi aranĝo; kaj esprimas sian pretecon kunlabori plue, kadre de projektoj konceptotaj en ĉi kultura spaco, kaj labori plue por la internacia diskonigo de la personeco kaj la poezio de tiu granda universala portugalo pere de Esperanto. Sanon kaj poezion!".

Ja ĉi atingo ne venas el nenio, sed sekvas el la bona agado, krom de miaj kompanoj, la iberiaj E-poetoj, de HEF, kiu senlace kaj konstante distamtamas novaĵojn pri niaj lingvo kaj kulturo ekster Esperantujon. Pasintjare HEF diskonigis diversajn aspektojn de nia afero radie, gazetare, televide, kulturcentre... en 80 okazoj! Ne strange do, ke kantistoj, verkistoj, artistoj aŭ intelektuloj, kiuj bezonas kunlaboron de esperantaj kolegoj, sin turnas al la HEF-ejo por peti kontaktigon kun ili. Tiel estis ĉi-okaze.




Per ĉi artikolo do mi volas esprimi, krom mia feliĉo pro la partopreno mia kaj de miaj kolegoj de la Ibera Skolo en la antologio *O sol é secreto, poetas celebram Eugénio de Andrade*, miajn plej elkorajn gratulon kaj dankon al la gvidanta HEF-skipo.

Sanon kaj poezion!

# EL LA POEMARO *REV-ENE*


*Pasintjare, publikigita de SAT – Eldona Fako Kooperativa, aperis en Parizo mia tria poemaro, "Rev-ene". Ĝin mi prezentis kadre kaj de la HEF- kaj ILEI-kongreso en Madrido kaj de la UK en Lisbono. Ĉi-jare, kaj kadre de la Triopa Malaga Kongreso kaj de la Barcelona SAT-Kongreso, ĝin mi prezentos en la formo de spektaklo nomata "Mia liriko kaj la muziko". Jen unu poemo el tiu amata poemaro*:

**PANJO**

*La 1an de januaro 2018, kvar jarojn post ol vi foriris porĉiame*

Mi staras antaŭ nia dom' tiama,
post tiel longe, ke l' animo sentas,
ke mi revenis al Itak' alia.
Mankas viaj littukoj en la horto,
kiujn la vento faris
– kiel fajna odoro je suno kaj lavendo! –
papilioj gigantaj kaj blankegaj
aŭ veloj bonaj por ke mi navigu...
Al kiaj Ilionoj?
Al kiaj Amerikoj?
Al kiom da Mirlandoj?

Restas nur la lanugo de birdoj kaj de fruktoj
en eterna ŝvebado:
la mornaj tempoflokoj el forges' kaj foresto.




---

Kio do pri la muzikskatoleto
kun la baletistin', kiu turniĝis
kun nostalgia gesto
laŭ taktoj el *La lago de la cignoj*?

Kio pri l' *Telefunken*-ricevilo
kun magia okulo hele verda
kaj frunt', el kiu ŝprucis la sonoroj
ravaj de *La legendo pri la kiso*,
dum vi lerte lesivis la tolaĵon,

kaj la buljono bolis poreterne,
kaj la horloĝoj ŝrumpis sur la mebloj?

Ĉi tie restas nure,
krom ĉi polusa vento
koroda, penetrema,
la senĉesa rabado far forges' kaj foresto.

Endas fermi l' okulojn por vidi vin ĉi tie,
por sensi vin ĉi tie,
tiun enorman amon,
kiun vi prodigadis
    malpatose,
tiun enorman amon
en la formo de kantoj
*– Ja ne foriras, ne, la kolombino –*,
tiun enorman amon
trempitan en tragika vivosento:
perdo de filo, frato kaj milito,
terura perdotrio!
Paĉjo, kontraste, ĝin sukcesis venki
centrante sin sekundo-post-sekunde
al ĝojo esti viva.
Lia enorma amo
havis la formon de vortoj kaj de kisoj[1]
kaj ofte de jubilo.

---

[1] *La legendo pri la kiso*: muzikpeco el fama samnoma zarzuelo [hispane, *zarzuela*, iuspeca hispana opereto], kiu, kun libreto de Enrique Reoyo, José Silva Aramburu kaj Antonio Paso, kaj muziko de la majstroj Reveriano Soutullo kaj Juan Vert, sukcese premieris en la madrida Teatro Apolo la 18an de januaro 1924.

Mi fermas la okulojn
kaj vidas vin sidanta sur la supro
de la tegmento de l' sonorilturo
fronte al nia domo.
Mi ĉiam kredis kion vi, laŭdire,
rakontis bubin-aĝe:
iam fortega vento vin sorigis alten.
Min la fortega vento de la poezio
portas al la altaĵoj de l' rakonto via
kaj de la paĉjaj versoj
eble tial, ke vi min naskis tio
– nur en la bona senco de la vorto –:
poeto.

Mi fermas la okulojn
kaj vidas vin en via lasta tempo,
post kiam vi revenis al ĉi via Itako,
en la unuaj tagoj
de via lotofaga alchajmero.
Kia doloro vidi vin ĉiam pli perdita
en tiu angor-dona labirinto!
Kiom mi penis por la koron bridi
vidante vin ploradi
de la plej pura el la emocioj
ĉe miaj kantoj, panjo,
kiam vi lokis min kaj vin kaj ĉion
en la paseo!

Sed vi jam ne bezonis la memoron.
Por kio do cetere ĝi utilus,
se en la loko,
kien vi estis baldaŭ vojaĝonta,
regas nure forgeso kaj foresto?

*Miguel Fernández*


BONVENON
en la triopa Kongreso
de Esperanto
Malago 2019
IFEF, HEF, AEU
LINGVA SITUACIO EN EŬROPO
Legosigno